Johann Wolfgang von Goethe,

Deziro por la nova jaro

tradukita de Joseph Ferdinand Berger

Sorta donaco:
Inter malnovo,
Inter la novo
Nia plezur',
Kaj pasintaĵo
Vokas revide;
Vokas konfide
Ankaŭ futur',

Horoj afliktaj
Mise sin ŝovas,
Penojn almovas -
For estas ĝu';
Pli bonaj tagoj
Nin rekolektas,
Gaja aspektas
Vivo jam plu!

Ĝojo'n, suferon
De la pasintoj
Ni postrestintoj
Sentas en kor'.
Ho, ofte sorto
Strange kombinas:
Malnovon finas
Nova humor'.

.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....

...

.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....

Kiel en danco
Jen sin disigas.
Jen ree ligas
Amplena par':
Tiel tra l' vivo -
Kitla konfuzo -
Gvidu nin muzo
Al la novjar'!

Traduko de la Germana poemo "Zum neuen Jahr" de Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Joseph Ferdinand Berger *(∗1894-10-07 – †1976-03-28).*

Arg-497-971 (2009-11-22 22:57:27)

Pri Joseph Ferdinand Berger vidu la retejon `http://wapedia.mobi/eo/Joseph_Ferdinand_Berger#2.`.